

SCIENCA REVUO de Internacia Sciencia Asocio Esperantista BEOGRAD, Jugoslavio	El Vol. 27 n-ro 1(117) 25.02.1976.
---	--

## EN LA "INSULO DE ENIGMOJ" LA DISKO DE FAJSTOS

(A. ATANASOV, SOFIO, BULGARIO)

En la komencaj dekoj de la nuna jarcento la atento de historiistoj, arkeologoj kaj lingvistoj estis kaptita de malkovritaj spuroj de antikva kulturo, ekzistinta sur la insulo Kreto en la epoko de la XX-XII jarcentoj antaŭ nia erao, antaŭ la veno de helenoj en tiun ĉi regionon. Tiu kulturo, jam konata sub nomo "Kreta-Mikena", ĝis hodiaŭ estas objekto de multaj kaj plurflankaj esploroj; Kreto estis nomita "insulo de enigmoj".

Tian enigmon prezentas ankaŭ la argila disko, kiun en la 1908. trovis la itala esploristo I. Pernier, serĉante restaĵojn de palaco apud la antikva urbo Fajstos. 1/ Tiun trovaĵon oni datumas je ĉirkaŭ j. 1700 a.n.e.; ĝi estas la unua ĝis nun trovita ekzemplero, kun stampitaj piktogramoj.

Sur ambaŭ flankoj de la disko estas klare enstampitaj 259 signoj - figuroj de: birdo fluganta, felo, boato, homo paŝanta, hakilo, hunda kapo k.a. La figuretoj estas grupigitaj en faketoj, dislimigitaj per vertikalaj strekoj; ĉiu tia grupo estas konsiderata vorto aŭ sintagmo.

1/ *Fajstos*, elparolata de iuj *Festos*.

La demandoj pri la signifo de tiuj ĉi signoj kaj ĝenerale de la teksto, skribita per ili, pri la lingvo, en kiu estas tiu ĉi skribo, kaj pri la popolo, kiu parolis tiun lingvon, estis traktataj ĝis nun de multaj aŭtoroj. Amasiĝis sufiĉe granda literaturo dediĉita al tiuj problemoj. Komence iuj supozis, ke la skribo estas en iu tre antikva greka dialekto. Frue tamen la bulgara lingvisto akad. Vladimir Ivanov Georgiev pruvis, ke en tiu regiono iam, antaŭ la veno de helenaj triboj, ekzistis antikva pralingvo, kiu ne estis la greka. Li estas unu el la unuaj, kiuj esploris la lingvon, kaj li donis valoran kontribuon por deĉifrado de la Kreta-Mikena skribo. Speciale pri la disko de Fajstos la nombro de la provoj deĉifri ĝiajn signojn jam superas 100, tamen ĉiuj ili restis sen sukcesa solvo. Lastatempe ĝuste akad. V.I. Georgiev trovis la serĉatan solvon: *li sukcesis deĉifri la signojn de la disko.*

En sia esplora laboro li aplikis specialan metodon. Komence li direktis sian atenton al antikvaj aŭtoroj kaj historiografoj. Laŭ la "Odiseo" de Homero, antaŭ la enmigro de helenoj en la insulo, tie loĝis kvin popoloj: eteokritoj, pelasgoj, kidonoj, aĥeoj (aĥajanoj) kaj dorianoj. Plej fruaj loĝantoj inter tiuj ĉi kvin popoloj estis la eteokritoj kaj la pelasgoj. Miksite inter la eteokritoj loĝis ankaŭ "termiloj"; tiuj ĉi lastaj frue transmigris en Likion (en la Nordokcidenta Malgrandazio) sub gvido de la frato de la legenda reĝo Minos. Tie ili ricevis nomon *likoj* (likianoj). La *likia* lingvo ne estas nekonata en la scienco: jam ĉirkaŭ cent surskriboj en ĝi estas malkovritaj kaj sukcese esploritaj; en ili oni malkovris ankaŭ la nomon "termiloj". La plujaj esploroj venis al konstato, ke la *likia* lingvo estas malfrua dialekto de la *luvia* lingvo. Cetere estas sciata, ke la *luvia* kaj la *heta*<sup>2/</sup> lingvoj

---

<sup>2/</sup> *Heta* - laŭ PIV *hitita*, en la Esp. traduko de la Biblio *hetida*; france *hittite*, ger. *hethitisch*.

estas parencaj; ili formas la heto-luvian lingvogrupon. Tiujn ĉi lingvojn akad. V.I.Georgiev konas; li verkis rimarkindajn studojn pri ili. Nun, esplorante la piktogramojn sur la disko de Fajstos, li havis en konsidero la strukturojn de la menciitaj lingvoj kaj same la fonetikan valoron de iliaj skriboj, kaj ankaŭ la *mikenan silaban skribon* de la XIV-XII jc. a.n.e. El tiuj esploroj li deduktis sekvaĵajn principojn por deĉifrado:

1. Ĉiu signo devus esti konsiderata kiel *silabo* (kiel tio estas en la mikena kaj la luvia skriboj).
2. Ĉiu signo devas prezenti fonetikan valoron de la unua silabo de luvia vorto, nomanta la objekton en ĝi.
3. Signoj, kiuj estas egalaj aŭ similaj al tiuj de la mikena silaba aŭ de la luvia piktograma skriboj, devus havi saman fonetikan valoron.
4. Kombinatorikaj konsideroj.
5. La konstatitaj fonetikaj valoroj de la signoj devas ebligi legadon de *luviaj* vortoj.
6. La fonetika valoro de signo povas esti taksata kiel konfirmita kun certeco, se ĝi respondos al 2 aŭ 3 el tiuj ĉi principoj.

Kelkaj ekzemploj:

Signo *hunda kapo* havas korelativaĵon en la luvia piktograma skribo; en ĝi tiu ĉi signo difinas la silabon *su*. En luvia lingvo "hundo" estas *suvana*, do la komenca silabo de la korelativa vorto estas *SU*. La fonetika valoro de tiu ĉi signo ebligas legon de luviaj vortoj, el kio sekvas, ke *su* estas difinita laŭ 3 el la nomitaj principoj.

Signo *birdo fluganta* havas korelativaĵon en la mikena skribo; en ĝi la signo signifas *khu* (*ku*). En la heta (kiel same en la luvia) "birdo" estas *huva*. La fonetika valoro *hu* de tiu ĉi signo ebligas legi luviajn vortojn. Do ĝi estas certa.

Juĝante laŭ la surskriboj de Mikeno, oni povus atendi ankaŭ en la teksto de la disko de Fajstos plurajn nomojn - de



personoj kaj de geografiaj objektoj. Kaj fakte tiel estas. Laŭ la supre eksplikita deĉifra metodo oni starigas nomojn jam konatajn el aliaj fontoj:

personaj nomoj: Jara, Jarinu, Jaramuva, Lilimuva, Runda, Sandapu, Sarma, Sarmasu, Sandatimuva, Terhumuva, Uparamuva;

geografiaj nomoj: Apasa (nomo de la urbo Efesos en luvia lingvo), Gazena (urbo en Malgrandazio), Jalisos (urbo en la insulo Rodos), Vilusa (nomo de Ilion - Troja en la luvia lingvo).

Laŭ tiu ĉi vojo, aplikante la metodon, oni atingas starigon de nomoj kun konstantaj konsistaj partoj -muva, -pija, kaj atingas plenajn nomojn - jam konatajn el aliaj fontoj - kiaj: Jaramuva, Sarmasu, Tarhumuva k.a.

Ĉio ĉi konfirmas la pravecon de la aplikata metodo de deĉifrado.

Kaj jen la traduko de la teksto:

#### Faco A

Kiam Jara direktiĝis militire kontraŭ Lilimuva, direktiĝinte kaj ne sukcesinte, Jaramuva forigis lin, forpelis sian favoraton kaj li mem frakasis Lilimuva'n.

Tamen pri Jara Tarhumuva decidis, ke li retiru sin al ripozo. Li (Tarhumuva) preme perfortis la limon (la landon) de Sandapi, Apupimuva forkuris.

Sandapia kaj Apupimuva fortiris sin al la regiono de Samos.

Uparamuva min renkontis, kolera pro sia tuŝita intereso. Runda tamen faris perforton kaj lin forpuŝis.

Sarmasu retiris sin ĉe Jaramuva'n.

#### Faco B

Sarma pripensas kaj konstruas libere sian planon: li incitas. Ilion (Trojo) lin kuraĝigas, sed mi gardas min.

Sarma, kolera pri Efesos, decidis por sia profito. Ilion kuraĝigas lin.

Sarmasu liberiĝis, alvenis kaj uzis perforton. Ilion kuraĝige incitis lin.

Por humiligi Jarinu'n li iris en Jalisos'on, metis pezan tributon, sed manifestis indulgon kaj retiris sin en Gazenan.

Sed Jara koleras pro la humiligo. Jara kolektis la grenon (rikolton), li garantiis al mi feliĉan vivon kaj ĵuras ne kaŭzi malagrablojn, ĉar tio ne estas en lia intereso.

S a n d a t i m u v a

(Sandatimuva estas la aŭtoro de la teksto.)

+ +  
+

Pli multajn detalojn pri la esplorado de la teksto sur la disko oni trovos en la verko mem de akad. Vladimir I. Georgiev en la revuo "Linguistique Balkanique" (Balkana Lingvistiko) XIX, 2, 1976, eldono de la Bulgara Akademio de Sciencoj.

La atingita sukcesa deĉifro de la teksto sur la disko de Fajstos vekis grandan intereson en la medioj de fakuloj en multaj landoj.